



Europe Démocratie Espéranto

adresita al S-ro Alfonsi , al grupoj de parlamentanoj , al la Prezidanto de la Eŭropa Parlamento kaj eŭropaj ĵurnalistoj

La 28an de septembro 2013

Estimata eŭropa civitano,

Per favora voĉdono por raporto de s-ro Alfonsi , nia Eŭropa Parlamento , denove volis atentigi pri malfruoj, paneoj en la efektivigo de lingva politiko, kiu kontentigu la alineojn de Eŭropaj Traktatoj pri defendo de kultura kaj lingva diverseco. Ni , Eŭropo Demokratio Esperanto, apogas tiun volon kaj ve faras saman konstaton. Via pozicio esperigas nin, ke vi konsideros kun intereso la proponojn, kiuj ni faras je politika nivelo ekde 2003 .

Jen do tempo por ni, relanĉi nian demandon: "kiel firme stareblas tiuj principaj proklamoj, se la iloj de ampleksa kaj kohera lingvopolitiko ne estas pritraktitaj"? Ĉar kiel Grin raporto montris , certe ne per aldono pli kaj pli, de 60 jaroj, de instru-tempo por senfina lernado de angla kingvo, eblas honeste pretendi defendi lingvan diversecon. Ĉiu sia gepatra lingvo kaj kultura lingvo kaj promocio de diverseco de lingvoj kaj kulturoj , jen estas la bazo de la konsento de Eŭropa Unio staritaj en la Traktatoj . Tamen ĉi tiu minimumo estas jam en danĝero aŭ jam detruitaj pro super- investo je homa tempo kaj financaj rimedoj, iel submetante civitanojn kaj iliajn reprezentantojn sub ŝrumpitaj angla lingvo kaj kuturo, kaj starigante inter eŭropanoj neakcepteblan malegalecon. Tiu stato kreas gaarantion de fiasko ! Demokratio rendevuas kun niaj esperoj , scienco kaj teknologio, kaj sekve ekonomia agado estas for de optimumo, politikaj decidoj estas malrapidaj, neakurataj kaj ne subtenata de eŭropa civitanoro. Ĉi tiu lingvopolitiko, ordigita kaj ampleksita dum sesdek jaroj malhelpas konstruon de Eŭropo, kaj sen iama iela prikritiko. Ni denuncas tiun blindiĝon, ĝuste ĉar ni disponas solvon elprovita de pli ol jarcento.

Ni , Eŭropo Demokratio Esperanto proponas en la kampo de komerco , eŭropaj sciencaj kaj internaciaj interŝanĝoj, uzon de la internacia lingvo Esperanto. Nur kelkaj monatoj por studo, kun simpla lerno-procezo , kondukante al esprimovo je nivelo klare super tiu de fragmentoj de angla lingvo aktuale trudstudita per granda elspezo . Spite subteno de institucioj kiel UNESKO kaj multaj famaj peersonoj pro siaj laŭlonge de historio antaŭvidkapabloj, ĉiu povas konsta ti la ostracismon de eŭropaj povoj rilate al internacia lingvo Esperanto. Tamen la transigo de dekono de elspezo por angla lingvo, kiu estas maljusta kaj malefika por demokratio, sufiĉus por havigi al ĉiu civitano fluan uzon de Esperanto, tiel faciligante lernadon de aliaj lingvoj kaj liberigante la rimedojn bezonataj por subteni lingvan diversecon sopirita far Alfonsi raporto. Kompreneble, kaj tio probable vidiĝendus kvazaŭ klarigo de ĝisnuna historio, Esperanto male nacia lingvo

kiel la Angla, ne povas esti la ilon de dominado de unu grupo super la aliaj aŭ profit-garantio por tiuj kontraŭ la aliaj. Sekve, ni alvokas emfazi Alfonsi raporton per tiu fundamenta demando: Ĉu eŭropaj deputitoj, kiuj zorgemu pri funkciado de demokratio , kaj konservado de kultura heredaĵo, povas neglekti la proponojn de Eŭropo Demokratio Esperanto? Kelkaj el vi jam esprimis intereson pri tiuj temoj , sed la deklaroj de grandaj povo-partioj daŭrigas la silenton pri tiuj nepraj iloj por funkciado de demokratio je eŭropa nivelo.

Pro tio, Eŭropo Demokratio Esperanto portos tiujn proponojn en venonta debato de eŭropaj elektoj de 2014. Ni dankas vin por via atento. Bonvolu akcepti niajn plejrespektemajn salutojn.

Vivu kulturo , vivu demokratio vivu Esperanto por vivo de Eŭropo

Por konsilio de E.D.E
Denis-Serge Clopeau